

La enigmoj de la festo

La enigmo de La Sago


- Sur la ĉi apudan celtabulon vi pafas tri sagojn.

- Sago, kiu maltrafas la tabulon valoras neniun poenton.
- Kiu estas la plej malalta rezulto neniel atingebla?

La SAGO
La Sat-Amikara Gazeto



Pitagora numero



- Polikrato, tirano de Samos, demandas Pitagoron pri la nombro de liaj studentoj.
- « Fortuna Pitagoro, helikona muzido, diru al mi, kiom da atletoj en via lernejo dresas vi por la gloraj filozofiaj ekzercoj? »
- « Mi tuj respondos al vi, Polikrato: duono studas la belajn matematikajn sciencojn; la eternan naturon observadas kvarono; septono ekzerciĝas al silento kaj meditado; krome estas tri virinoj, inter kiuj eminente distingiĝas Teano. Jen la nombro de miaj disĉiploj, kiuj estas ankaŭ tiuj de la muzoj. »

Kiom da gestudentoj sekvas
la instruojn de Pitagoro?

Multnombra familio

- Alberto kaj Martina estas gefratoj el multnombra familio.
- Alberto havas dufoje pli da fratinoj ol da fratoj
- Martina havas samnombrajn fratinojn kaj fratojn



Kiom da infanoj vivas en tiu familio?
Kiom da filoj? kiom da filinoj?

Kvin flor-linioj!

- Surtabligu tiujn dek florojn tiel ke ili konsistigu kvin kvarflorajn liniojn.



Je via sano!



- Surtabligu du glasojn. En la maldekstran enverŝu vinon. En la dekstran saman kvanton da akvo.
- Prenu nun unue kuleron da vino el la liva glaso kaj miksu ĝin en la akvon.
- Due prenu kuleron el la dekstra glaso kaj miksu ĝian enhavon en la vinon.
- Fine en la maldekstra glaso troviĝas vino kun iom da akvo kaj en la dekstra iom da vino en akvo.

Ĉu estas pli da akvo en la vino aŭ
pli da vino en la akvo?

La nufaroj

- Nufaro duobligante sian surfacon ĉiun jaron entute kovras la lageton post dek jaroj.
- Kiom da tempo estus necesa por ke la lageto estu entute kovrita, se tie kreskus du samkvalitaj nufaroj?



Taksio!

- Iom malfruante taksiŝoforo iras kontraŭsense unudirektan straton.
- Policanoj arestas kaj kontrolas lin.
- Tamen li rajtas foriri sen ricevi ajnan riproĉan monpunon.



Kial?

Alteco de la flava genciano

- Al Klodin' admirante flavan gencianon dum migrado sur alpa monto mi demandis: Kiom alta estas tiu genciano?
- Tute prave, tamen enigme ŝi respondis : Ĝi mezuras 60cm plus la duono de ĝia propra alteco.

Kiom alta estas tiu
flava genciano?



Magia nodo



- Vi prenu ambaŭ ekstremaĵojn de ŝnureto, po unu en ĉiu mano.

Kiel fari nodon sen deteni la ŝnuron?

La sempotoj

- Vi rajtas tuŝi nur unu poton.
- Kiel harmonie ordigi la ĉi subajn sempotojn alternigante plenan kaj malplenan?

